Walter KLAG
kaj kunaŭtoroj

# SAT.IROJ




## Kvara kajero

2020

# La aŭtoroj
# kaj la kontribuantoj

Albert EINSTEIN, 1879 - 1955, germana fizikisto

Peter ROSEGGER, 1843 - 1918, aŭstria verkisto

Marie von EBNER-ESCHENBACH, 1830 - 1916,
aŭstria verkistino

NAPOLEONO La Unua, 1769 - 1821, franca imperiestro

Johann Martin SCHLEYER, 1831 - 1912,
inventisto de Volapuko

Irene KLAG, Vieno

Walter KLAG patro, Vieno

Walter KLAG filo, Vieno




.. kaj inteligenta!

# KONDUKO ENA

Karaj gelegantoj, estimataj normalaj homoj, geesperantistoj kaj geneesperantistoj!

Ĉiutage venas al ni amaso da leteroj rete kaj papere, en kiuj ni estas urĝe petataj baldaŭ eldoni la kvaran volumon de Sat.iroj.

Ni ne povas daŭre turmenti nian legantaron, jen la re-stulto!

Atendante vian eternan dankon

La aŭtoroj

# HAVO ENA

La lingvo bona … 3
Eblas ne pli saĝe … 4
Signifo vera … 5
Album.ino … 9
La trovo de Ameriko … 13
Albumo finvenka … 15
Enigmo ... 20
Informo por turistoj ... 20
Ŝerco bona ... 20
Citita ... 20

# LA LINGVO BONA

Nia kara lingvo estas genia, ĉar oni povas logike konstrui kaj malkonstrui vortojn:

En Ruslando loĝas rusoj.
En Danlando loĝas danoj.
En Islando loĝas isoj.

# EBLAS NE PLI SAĜE

§ 1: Preskaŭ ĉiuj prognozoj ne realiĝos.
§ 2: Se vi parolas kun frenezuloj, diru nur jes.
§ 3: Oni estas kontraŭ novaj ideoj, ĉar ili ne sukcesis antaŭhieraŭ.
§ 4: Paseroj gajas, ĉar ili ne pensadas superflue.
§ 5: Vi estas la plej grava homo en via vivo.
§ 6: Vi tute samopinias kun vi mem.
§ 7: Se vi planas ion, ne parolu pri ĝi.
§ 8: Sata sklavo malŝatas liberecon.
§ 9: La leĝo de la pli forta estas la plej granda maljusteco.
§ 10: Helpanto rikoltos maldankon.
§ 11: Stulteco estas ĉiam la stulteco de aliaj.
§ 12: Justeco ofte estas pli malagrabla ol maljusteco.
§ 13: Politike dekstra aŭ maldekstra aŭ pensanta.
§ 14: Kiu evitas problemon ekhavas multajn.
§ 15: Oni ne havas zorgojn. Oni faras ilin al si.
§ 16: Antaŭjuĝoj pli fortas ol faktoj.
§ 17: Sekvi trendon ŝparas pensadon.
§ 18: Pasinteco estas riĉeco, ne perdaĵo.
§ 19: Homo eltenas ĉion krom la vero.
§ 20: Cerbo produktas mondojn.
§ 21: Filo plifortiĝas kiam patro malplifortiĝas.
§ 22: Inteligento estas limigita, stulteco estas senlima.
§ 23: Historio estas la ĝenerale akceptata mensogo.
§ 24: Ili (kiuj?) volas viajn tempon, pensadon kaj monon.
§ 25: Se ĉiuj same false pensas: Neniu rimarkas.
§ 26: Pli facilas ripeti sensencaĵon ol plibonigi ion.
§ 27: Malmultaj havas nenion por diri kaj tial silentas.
§ 28: Kial multaj ne okupiĝas pri siaj aferoj? Ĉar ili tiajn ne havas.
§ 29: Eterna vereco sen dubo estas fino kaj morto.
§ 30: Malriĉuloj volonte donacas.
§ 31: Du aferoj estas senlimaj: La universo kaj la homa stulteco, sed ĉe la universo mi ankoraŭ ne estas tute certa.
§ 32: Ne pensu pri homoj, kiuj ne pensas pri vi.

# SIGNIFO VERA




ve.sperto



estra.rano


mus.kolo



câm.breto



# konk.ludo




KONKO Abdoulay estas franca futbalisto

ur.ologo



am.fi.teatro

## ALBUM.INO



in.terna




in.tima



in.flamo



in.formo




in.kubo



in.vento



in.vesto




in.diko



in.fero



in.fluo

# LA TROVO DE AMERIKO

## de Peter ROSEGGER

Iam estis viro, kiu povis starigi ovon.
Li nomiĝis Kolumbo. Iam la reĝo de Hispanio diris al tiu: „Kolumbo“, li diris, „Ĉu vi bonvole volus trovi Amerikon?“
„Ho jes“, diras la Kolumbo, „tion fari mi ŝatus. Mi ja estas la Kolumbo!“
„Bone“, diras la reĝo. „Mi donas al vi ŝipon, sursidu kaj ekvojaĝu!“


Nu bone! La Kolumbo sursidas, kelkaj aliaj ankaŭ sidiĝas ĉe li kaj ili ekvojaĝas.

Post kelktri tagoj la stiristo venas de la pruo en la ĉambreton al Kolumbo kaj diras: „Kolumbo, mi vidis ankoraŭ nenion, neniun teron, ne!“
„Ankaŭ la ovo ne jam staras“, diras la Kolumbo, „ni pluveturu!“

La kvaran tagon venas li, la stiristo, denove de la pruo, li rapide kuras en la ĉambreton al Kolumbo:
„He, Kolumbo, mi ne jam vidas neniun teron, ne!“
„Ankaŭ la ovo ne jam staras“, diras Kolumbo, „ni pluveturu!“

Kaj tiel ili daŭrigas kelkdek tagojn.
Surprizite venas la stiristo al Kolumbo:
„Kolumbo, mi vidas teron!“
„Ĉu mi ne ĉiam diris tion?“, diras la Kolumbo, „Ankaŭ mia ovo staras.“

Kiam ili poste veturas al la tero, jen kuras tien kaj reen nigraj viroj sur la firma grundo.
„Bonan matenon!“, diras la Kolumbo, „Permesu al mi demandi: Ĉu tio estas Ameriko?“



„Jes certe“, diras la nigruloj.
„Kaj vi estas la negroj?“
„Jes certe“, ili diras, „tiuj ni estas, kaj vi sendube estas la Kolumbo.“
„Estas vero!“, diras la Kolumbo.
„Damne, amikoj!“, krias la nigruloj. „Ni estas trovitaj!“

Modelo, foto kaj traduko el la stiria lingvo de Walter KLAG patro

# ALBUMO FINVENKA




Fulda, Germanio




Kopenhago

DORMA

VETURILO
WARSZAWSKI ROWER PUBLICZNY












Crikvenica, Kroatio
Nedjeljno ludilo = Dimanĉa frenezo




Celle, Germanio





Rejkjaviko




Islanda birdo ĉe bordo




Flughaveno internacia de Rejkjaviko




En montrofenestro en Rejkjaviko

# ENIGMO SERIOZA

Kiuj paragrafoj en *Eblas ne pli saĝe*
estas de EINSTEIN,
EBNER-ESCHENBACH
respektive NAPOLEONO?

# INFORMAĈO POR TURISTOJ




Enirejo de kiosko sur la Kalva Monto en Vieno

# ŜERCO TRE BONA

Juĝisto: „Vi damaĝis pruntitan aŭton. Kial?"
Akuzito: „Unue mi ne pruntis aŭton, due la damaĝo jam estis, kiam mi transprenis la aŭton kaj trie mi redonis la aŭton sen damaĝo!"

# CITITA

„Por ke ŝerco estu bona, ne sufiĉas nomi ĝin tia!
**Menade bal - böfi bal!"**

Johann Martin SCHLEYER dum la
Dua Internacia Ŝercista Kongreso Volapukista
en Berlino 1911.

